# I N F O R M I L O

**Esperanta tradicio – kultura heredaĵo en Kroatio (Z-7298/2019)**

***3-2025(140) julio ĝis septembro***

***Esperanto društvo Rijeka* Esperanto Societo Rijeka***

***Blaža Polića 2 51000 RIJEKA Hrvatska-Kroatio***

Tel.++385(0)(51)334-670 lunde de la 18a ĝis la 20a horo

Naslovi na mreži-retadresoj: rijeka.esperanto@gmail.com

IBAN: HR75 2402 0061 1002 1273 9,

**Prezidanto: Emil Hrvatin tel: 091 882 2986**

**Redaktoro: Dr.sc. Ana Alebić-Juretić, dipl.ing. tel.: 091 563 1634**

Rijeka, la 20-a de oktobro 2025

Estimataj gesamideanoj,

somero, tempo de ferioj, estas tre grava por Esperantujo. Multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj okazas en somero. Somero estas ankaŭ tempo por viziti esperantistojn en aliaj landoj. En tiu ĉi numero *Informilo* informas vin pri 110a UK en Burno, 91 kongreso de italaj esperantistoj, vizitoj de esperantisoj kaj Tagoj de Esperanta kulturo en Rijeko. Ĝuŭ tiun ĉi numeron de *Informilo.*

## 110-a UNIVERSALA KONGRESO EN BURNO

La 110a UK okazis de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2025 en Burno (Ĉeĥio). La kongresa temo estis *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj* kiun gvidis Bengt-Arne Wickström. Dum la kongreso oni esploris la diversajn manierojn kiel teknologiojn povas subteni la kapabligon kaj konsciigon de homoj pri la temoj, kiuj fortigas pacon kaj konfidon kaj la rolon de Esperanto por atingi tiun celon. Abundan programon havis Internacia Kongresa Universitato, kun 17 prelegoj, tri kadre de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), ses IKU prelegoj kaj ok prelegoj en Scienca Kafejo. Inter la prelegantoj en Scienca Kafejo estis Ana Alebić-Juretić kiu prezentis la temon: *Lumo kaj poluado de la atmosfero*. La programo de la kongreso enhavis ankaŭ kursoj de Esperanto kaj la ĉeĥa lingvo, prezentado de libroj, literaturaj konkursoj, Esperanto-logia konferenco, Junulara programo kaj sporta programo. Al kongreso aliĝis 1069 partoprenantoj de 62 landoj. El Kroatio partoprenis 10 esperantistoj: Ana Alebić-Juretić, Marija Belošević, Nataša Dorosulić, Aleksandra Gabrilo, Grozdana Grubišić-Popović, Filip Ivančić, Josip Pleadin, Maja Tišljar kaj du esperantistoj kiuj ŝatis resti anonimaj.



*Ana Alebić-Juretić prelegis en la Scienca Kafejo*

*(Fotis: Granda)*

______________________________.

Lektoro: Elda Dörfler

## VIZITOJ DE FREMDAJ ESPERANTISTOJ

En la periodo antaŭ kaj post la UK en Burno, du grupoj de esperantistoj vizitis Kroation. Du esperantistinoj el Koreio - Oh Gisook (esperanta nomo Granda) kaj Lee Chungwon - post vizito al KEL en Zagrebo kaj al la lagoj de Plitvice, atingis Rijekon la 17-a de julio 2025. La unuan tagon ili vizitis Esperanto-klubon Rijeko kie ni babilis en Esperanto kun la membraro, kaj poste ni vizitis la kastelon de Trsato. La sekvan tagon ni faris ekskurson



*Vizito de la koreiaj esperantistinoj al Rijeka klubo*

per buso ĝis Mošćenice, de kie ni piediris malsupren per 760 ŝtuparon ĝis la plaĝoj en Mošćenićka Draga kie ni marbaniĝis. Antaŭ reveni hejme ni vizitis ankaŭ Lovran kaj Opatija, du urbetojn tre konataj pro turismo.

Post UK en Burno, ĉinaj esperantistoj decidis viziti Kroation. La vizitantoj estis d-ro. Xiaofeng Gong (esperanta nomo Arko), emerita universitata profesoro el Nanchang kaj estrarano de UEA, kaj Changsheng Zhang (Longarko) kun sia edzino. Arko havis gravan rolon en la Ĉina Esperanto-movado, ŝi estis prezidanto de la provinca Esperanto asocio (Jiangxi), estro de la Ĉina ILEI sekcio, estrearano de ILEI ĝis fariĝo Akademiano. Ŝi kaj Granda finis pasintjare la postdiplomajn studojn de Interlingvistiko kaj Longarko unujara instruista trejnado ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. Krom Zagrebon ili vizitis ankaŭ Rijekon, ekde la 7-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2025. Ni babilis pri la nuna situacio en Esperanto kaj la Esperanto-movado kaj ni vizitis la kastelon Trsat en Rijeko kaj la ĉirkuajn urbetojn: Mošćenice, Mošćenička Draga kaj Opatija. Kun Arko mi vizitis ankaŭ Pulon, urbo ĉirkaŭ 100 km sude de Rijeko, kun multaj restaĵoj el la romia epoko. Ankaŭ la ĉinaj esperantistoj ĝuis marbanadon sur la plaĝoj, sperton kiun oni ne havas hejme.



*La ĉinaj esperantistoj sur la kastelo de Trsato*

## 91a KONGRESO DE ITALAJ ESPERANTISTOJ

Dum la semajno de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto 2025 en Salsomaggiore Terme okazis la 91-a kongreso de italaj esparantistoj. Al kongreso aliĝis 124 esperantistoj, iom malpli ol antaŭe, el 21 landoj. La ĉefa temo de la kongreso estis *Esperanto – taŭga lingvo por la scienco,* gvidata de Amri Wandel, kiu ankaŭ estris la samtitolan seminarion. La aliaj seminarioj estis *La slava skolo de la unua periodo* de Alessandra Madella, kaj *Komunikado kaj AI* de Massimo Ripani. SUS- Sciencaj Universitataj Sesioj, kiel parto de IKU- Internacija kongresa universitato, enhavis 6 prelegoj, kaj inter ili Ana Alebić-Juretić prezentis *La tn politikaj arhitekturoj*. Krom sciencaj temoj, la kongreso ofertis lingvokursojn, prezentadojn de libroj, teatraĵojn, muzikajn programojn kaj ekskursojn. La urbo tiom subtenis la kongreson, ke la muzika programo okazis en la Placo de la Urbodomo- aŭ okaze de pluvo - en Kongresa palaco. Tiel la civitanoj kaj turistoj de Salsomaggiore povis partopreni al esperanta programo. *(Skribis kaj fotis: A. Alebić-Juretić)*

## TAGOJ DE ESPERANTA KULTURO

La 27a kaj 28a de septembto 2025a Esperanto societo Rijeka organizis la *Tagojn de esperanta kulturo*. La unuan tagon la klubanoj renkonriĝis ĉe la Hostelo Esperanto en Kostrena, kie estis preta ekspozicio de peintraĵoj de Branko Popović kaj Nirvana Beltrame Ferletta deklamis siajn poemojn en la fiuma idiomo kaj en Esperanto (traduko de Ana Alebić-Juretić). Posttagmeze en la tombejo de Crikvenica estis malkovrita la tombŝtono de Vjekoslav Morankić, la tre grava kaj longtempa prezidento de la nuna societo, kiu enhavas ankaŭ subskribon en Esperanto. Pri la vivo de V. Morankić parolis la nuna prezidanto de la societo Emil Hrvatin kaj Damir Morankić. Du gastoj el Zagrebo partoprenius en tiu parto: Ankica Jagnjić kaj Neven Kovačić.




*Malkovro de tombŝtono kun esparanta subskribo*

La sekvan tagon, grupeto de Rijeko partoprenis la *Karstajn tagojn* organizitaj de la 26-a ĝis la 28-a de septembro 2025. de la Triesta Esperanto Asocio (TEA) kaj promenis-grimpis tra Val Rosandra/Dolina Glinščice, ĝis la akvofalo kaj la limvilaĝo Botazzo/Botač. La gvidanto de la grupo estis Peter Grbec. *(A.A-J)*